

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 281 (48) - KVINA EPOKO

AUGUSTO - SEPTEMBRO - OKTOBRO 1992

TERRASSA
25.10.92

**Internaciaj
Floraj
Ludoj**

**Jara
Asembleo
de KEA**



ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO  KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)
Apartat/Postkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33
(ekde lundo ĝis vendredo inter la 20a kaj 22a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva
membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akade-
mio Internacia de la Sciencoj San Marino.

KOTIZOJ POR LA JARO 1992: Individua Abonanta Membro 2.200 p-toj; Individua
Subtenanta Membro 4.400 p-toj; Individua Dumviva Membro 44.000 p-toj; Kolektiva
Membro 4.400 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Libert Puig; Vicprezidanto: Maria
Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Hektor Alos; Kasisto: Lluís Armadans;
Komitatanoj: Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R. Guifón, Ĝirona Espero,
Francesc Ibanyes, Joan Marimon, Josep M^a Milla, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Óscar Puig.

KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriol Macip, Libert Puig. Komen-
cantoj kaj Progresantoj: Gemma Armadans.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la startpunkton
de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Gabriel Mora i Ara-
na (prezidanto), Willian Auld, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (florluda maj-
stro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (florluda majstro), Salvador Gumà i
Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (florluda majstro),
Krystina Ungar (florluda majstro), Joan Ramon Guifón i Roset (sekretario).

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence Bicknell (3aj IFL, Olot 1913), Artur Domènech
i Mas (6aj IFL, Reus 1916), Marià Solà i Montserrat (6aj IFL, Reus 1916), Josep
Ventura i Freixas (8aj IFL, Olot 1921), Jaume Grau i Casas (9aj IFL, Manresa
1923), Bernard Golden (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio Silfer (24aj IFL,
Olot 1984), Timothy Brian Carr (28aj IFL, Barcelona 1988), Krystina Ungar (30aj
IFL, Palamós 1990).

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Jo-
sep Tordera, Manuel Marquès.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol - av. Paralel, 96-6è -tel. (h)
329.24.81, (l) 241.94.11 - 08015 Barcelona.

KOMARKAJ DELEGITOJ: Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i
Roig - St. Magí, 20-3r - tel (93)893.71.76 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Ga-
rotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda - Escola Llar - Ctra. de la Canya, s/n - tel.
(972)26.38.29 - 17800 Olot (Garrotxa); Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La
Selva: Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Tarragonès, Alt
Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano - Apartat 482 - 43080 Tarragona (Tarrago-
nès); Baix Ebre, Montsià: Josep M. Altadill - Berenguer IV, 23 - tel. (973)44.20.09
- 43500 Tortosa (Baix Ebre); Illes Balears: Xavier Margals i Basi - Orient, 60 - tel.
(971)61.38.30 - 07110 Bunyola (Mallorca); Catalunya Nord: Joan Fernández -
Henri Matisse, 21 - F-66000 Perpinyà (Rosselló).

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell - Apartat 407 - Papa
Pius XI, 130 - tel. (93)716.36.33 - 08200 Sabadell (Vallès Occidental); Centre d'Es-
tudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo - St. Gervasi, 45 -
08200 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto-
Grupo - St. Josep, 20 - 08922 Santa Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club
d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto - Mallorca, 207-
pral. - tel. (93)453.95.07 - 08036 Barcelona (Barcelonès); Esperanto-Centre Ta-
rragona - Apartat 1236 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Esperanto-Fako "S. C.
Joventut Terrasença" - St. Francesc, 52 - 08221 Terrassa (Vallès Occidental) -
Esperanto-Grupo "Jozefo Anglès" - Apartat 336 - 08190 Sant Cugat del Vallès
(Vallès Occidental); Firma Tero Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà -
Gran Via, 592 - 08007 Barcelona (Barcelonès); Grup Esperantista Sant Pau d'Or-
dal - Dr. Zamenhof, 12 - tel. (93)899.30.33 - 08739 Sant Pau d'Ordal (Garraf); Ĝiro-
na Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Hispana Esperanto-Fervoje-
ta Asocio - Apartat 15027 - 08080 Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Es-
tudis Comarcals d'Igualada - Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700 Igualada
(Anoia).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

Kotizi por IFL

Kelkaj homoj surprizigis pro la nova postulo,
enkondukita en la lasta kunsido de la Plenum-
komitato de nia Asocio, pagi etan kotizon por
partopreni la Internaciajn Florajn Ludojn.

*Tiu surprizo estas logika, sed ĝi fontas el manko
de informoj pri la organizaj kostoj de nia Beletra
Festo. Laŭ la asocia buĝeto, IFL bezonas ĉiujare ĉ.
50.000 p-tojn. Tio ĉefe ŝuldiĝas al anoncaj kostoj:
sendado de kelkcento da leteroj al beletremuloj kaj
revuoj en la tuta mondo, kaj ĉi-jare ankaŭ reklamado
en revuoj Esperanto kaj Literatura Foiro (kiu ĝentile
postulis neniom, dank' al nia multjara kunlaboro).
Jurianoj ricevas nenian monhelpon, eĉ ne por parto-
preni la kunsidojn. Ĝis nun, nur tre escepte gajnintoj
de la Natura Floro estis invititaj al nia Festo, kaj
monpremioj neniam ekzistis pro manko de rimedoj.
Krome, la invito de Festparolanto, esenca parto de
la arango kaj eble eĉ la plej ŝatata, kompenŝiĝas
nur per apartaj subvencioj, kies kvanto tre ŝanĝiĝas
de jaro al jaro kaj ĝin oni nur malfruege ekscias; foje
ekestas grandaj defecitoj, kiel en la Sanktkugata aŭ
Lejda kongresoj, ĝuste pro tio.*

*Tial, la Plenumkomitato de KEA akceptis du
proponojn: postuli malaltan aliĝ-kotizon por parto-
preni nian Beletran Feston, kio parte ekvilibrigos la
bilancon de nia Asocio, kaj peti la malavaran done-
mon de niaj membroj per malfermo de Fondaĵo IFL,
por monpremi gajnintojn kaj inviti ilin partopreni nian
Feston, tiel ke nia konkurso fariĝos pli alloga.*

Internaciaj Floraj Ludoj
Terrassa, 25-an de oktobro

Asembleo de KEA
Terrassa, 25-an de oktobro

Seminario pri instruado
KEJ, 28-29-an de novembro

Gonçalo Neves festparolos

Pro operacio maloportuna por ni, István Ertl ne povos festparoli en la Internaciaj Floraj Ludoj. Gonçalo Neves, la pasintjara portugala gajninto de la Natura Floro, akceptis anstataŭ la hungaron. Gonçalo Neves ne nur triumfis en nia Festo, sed li ankaŭ estis premiita en la pasintjara literatura konkurso de Zagreba Esperanto-Ligo en la proza kaj poezia branĉoj. Laŭrojn li atingis en la Belartaj Konkursoj de UEA en la jaroj 1991 kaj 1992. Lia libro devas aperi venontjare komune kun tri elstaregaj hispanaj verkistoj, dum alia anonciĝas ĉe Flandra Esperanto-Ligo. ■

Stato de la Fondajoj

Fondaĵo Eldonaĵoj	
Rafael Margalef	300
Llibert Puig	5.000
Carbonell-Roger	10.000
Entute	25.300
Fondaĵo Floraj Ludoj	
Entute	10.000

Instrua seminario

La 6-an kaj 7-an de septembro okazis en Sabadell instruista seminario kun partopreno de 10-15 homoj.

Sabaton la 6-an, matene Llibert Puig kaj Hektor Alos prezentis la historion de la katalunaj versioj de la *Zagreba Metodo*. Oni ĉefe diskutis kelkajn plibonigojn de la nuna eldono por enkonduki ilin en la pretigata nova eldono por la tuja lernojaro.

Posttagmeze Gemma Armadans prezentis panoramon de modernaj legolibroj por komencantoj kaj progresantoj. Post ŝi Jomo Milla transdonis la ĵus ricevitaĵojn en instru-seminario en Ĉaŭdefono.

Dimanĉe matene, post longa nokto en la Sabadella ĉefestis, Hektor Alos klarigis pri la novaj instruprogramoj en ILEI, Bulgario kaj Hispanio. Pedro Martín aldonis sian personan sperton kiel ekzamenito en internacia ekzameno dum la Viena kongreso.

La kunvenintoj decidis rekte alpreni la internacian standardon de ILEI, sen aldono de naciaj specifajoj. Oni tamen rimarkis, ke en unu jaro regula kurso ampleksanta ĉ. 100 lernohoroj oni ne povas atingi la t.n. *elementan* nivelon de ILEI, kiel oni jam konstatis en Bulgario kaj Hispanio. Tial oni skizis tri-nivelan instru-programon kun ekzameno ĉe la fino de ĉiu ŝtupo.

Unua lernojaro entenos la materialon prezentitan en la A-nivelo de la *Zagreba Metodo*, kiu bezonas ĉ. 100 lernohorojn laŭ la sperto de Centro de Esperanto Sabadell. Fine okazos testo far ekzamenkomisiono de KEA, kiu liveros atestilon al la sukcesintaj dezirantoj. Tiu testo povos enhavi kelkajn tre bazajn demandojn pri la esperanto-kulturo (*Pasporta Servo* k.s.).

Dua lernojaro devos esti tia, ke la lernantoj atingu la *elementan nivelon* de ILEI. Por tio evidentiĝis, ke necesos aldoni al la nunaj *B-kursoj* ĉefe esperanto-

kulturajn materialojn. Fina decido estis, ke KEA organizu rekte ILEI-ekzamenojn fine de tiu nivelo.


La tria lernojaro devos enteni la konojn de la *meza nivelo* de ILEI. Same kiel pri la B-kurso, KEA ne organizos proprajn ekzamenojn, sed rekte alvokos internaciajn.

Oni ne postulos sukceson de ekzameno por partopreni en la sekva kurso.

Oni komisiis Hektor Alos pretigi instruistan libron por la A-kurso de la *Zagreba Metodo*, kiu enhavos la solvon de ĉiuj ekzercoj. Samtempe, oni rekomendis al ĉiuj instruistoj ekzameniĝi en ILEI-ekzamenoj kaj partopreni la venontjaran ILEI-konferencon, kiun oni organizos en València aŭ Barcelona.

La partoprenintoj decidis kunveni ankoraŭ almenaŭ trifoje: la 3-an de oktobro pri pedagogiaj iloj, la 7-an de novembro por difini la historiajn kaj kulturajn elementojn de la A- kaj B-kursoj, kaj la 12-an de decembro por interŝanĝi spertojn pri la komencitaj kursoj. La kunvenoj okazos en Sabadell ekde la 10-a matene. Partoprenemuloj telefone informu ĉe nia Asocio. ■

Skemo de la nova KEA-instruprogramo



Someraj stipendiitoj

Nia Asocio stipendiis la partoprenon de du homoj en someraj aranĝoj. Xavier Nebot, el Sabadell, stagiis en *Kvinpetalo* en meza-supera kurso gvidita de Giorgio Silfer. Lian ĉeeston parte financis ankaŭ Kooperativo de Literatura Foiro. Josep Maria Milla, el Mataró, partoprenis en La Chaux-de-Fonds instruistan seminarion far Ilona Koutny. Post la reveno, li transdonis siajn novajn konojn en la kunveno de KEA-instruistoj (vidu apude). ■

1-a Mez-Eŭropa Junulara Semajno



Jarek Parzyšek, iama prezidanto de la LKK en Krakovo dormas sur la podio dum la adiaŭa vespero. Foto: Sunyer.

Tuj post la tradicia Internacia Junulara Semajno en Hungario, okazis nova kongreseto, kiu arigis centon da homoj en Olomouc. Olomouc estas laŭdire la dua plej bela urbo el Ĉeĥio, sed fakte Prago entute eklipsas tiun plaĉan provincan universitat-urbeton el Moravio.

Principe la arango devis esti ege interesa, ĉar ĝin kunorganizis ĉiuj landaj junularaj asocioj, kiuj ja estas la plej gravaj (i.a. Germanio, Polio kaj Hungario!). La programo fakte sufiĉe malriĉis: la diskut-temoj estis tro supraĵe pritraktitaj, apenaŭ ekzistis elekteblo de prelegoj kaj inter ili neniu aparte brilis. Tio, kompreneble, ne multe maltrankviligis junuletojn, kiuj povis babilu kaj senfine trinki

bieron (25 p-toj por duona litro en la bierlando!). La LKK, aliflanke, sufiĉe bone prizorgis la turisman-ekskursan programon.

La estonto de tiu ripoz-semajno estas malklara. Ĝi fakte rekte konkurencas la hungaran IJS, pro kio ambaŭ renkontigoj havis relative malmultajn partoprenantojn ĉi-jare. Dum la venonta, kun antaŭvideble malmultekosta IJK en Eŭropo (kio ne okazas de jaroj), tiuj arangoj ankoraŭ pli krizos; des pli kiam okazos tria arango, la oficiala antaŭkongreso de la IJK, en Témésvar/Timiŝoara (Transilvanio). Eble MEJS reduktiĝos aŭ ŝanĝos jarsezonon...

haf

Kelkaj bazaj konsideroj pri informado

La venonta KEJ-seminario pritraktos informadon. Tiu teksto utilu por ekpensigi la partoprenantojn.

1. Necesas distingi inter diversaj niveloj de informado, ĉiu kun sia propra celo kaj strategio.

Ĝenerala informado celas atingi la publikan konscion pri esperanto: ke ĝi ekzistas, kiel ĝi funkcias, por kio oni uzas ĝin. Ĉiuj kontaktoj kun la ĝenerala gazetaro, radio kaj televido troviĝas en tiu kategorio; ankaŭ bazaj informiloj, ekspozicioj, ktp. La efiko de ĝenerala informado estas grandparte subkonscia: rezultoj estas videblaj precipe en spontanaj aludoj al esperanto (pozitivaj aŭ negativaj), la intereso de ĵurnalistoj, kaj la sukceso de postaj informo-ŝtupoj.

Fokusita informado celas varbi subtenantojn el difinita grupo de la socio, surbaze de ties specialaj ecoj. Povas temi pri simileco de principoj (mondfederistoj, verduloj kaj aliaj formoj de internaciismo), eblecoj de kunlaboro (minoritataj kulturaj movadoj, lingvoinstruistoj), eblecoj de kunlaboro (ekz. kadre de bone funkciantaj fakaj asocioj k.s.), aŭ simple pri persona simpatio.

Aktiviga informado celas homojn, kiuj jam simpatias esperanton, sed ankoraŭ ne fariĝis esperantistoj. Ĝi montras praktikajn, konkretajn eblecojn (kursojn, legajojn, renkontigojn aŭ aliajn kontaktojn), kaj ankaŭ ŝancojn aktivi kiel "simpatiantoj", ekz. en politikaj prem-agadoj. Bona administranto aparte gravas por tiu ĉi nivelo.

Ĝustigo

En la pasinta numero de nia revuo, oni informis pri la pasintjare okazintaj kursoj en nia lando. Ne-kompreneble estis forgesita la meza kurso, kiu denove okazis en *Club d'Amics de la Unesco*.

La redaktoro pardonpetas.

Malpli da radioelsendoj en esperanto

Dimanĉe, la 14-an de junio vespere, *Radio Zagrebo* anoncis la ĉesigon de siaj elsendoj en esperanto. Ankaŭ subite la novaj mastrumantoj de *Svisa Radio Internacia*, kiu dum pli ol 40 jaroj elsendis en la internacia lingvo, decidis forigi la esperanto-elsendojn. *Pola Radio* limigis la esperantlingvajn elsendojn al du.

Esperantistoj konsciu, ke ĉiuj radiostacioj disondantaj en esperanto bezonas subtenon.

(el *Heroldo de esperanto*)

Integriga informado celas homojn, kiuj jam aligis al la movado, sed ankoraŭ ne plene trovis sian lokon en ĝi (tiu kategorio inkluzivas pli ol duonon de la membraro de meza esperanto-asocio). Klubo, revuoj, renkontigoj kaj personaj kontaktoj estas la ĉefaj rimedoj en tiu ĉi nivelo, unu el la plej problemaj.

Movada klerigo kaj aktivula trejnado konsistigas la lastan ŝtupon, kiu celas plialtigi la nivelon de la esperantomovado kaj ĝia komunumo. Inter la rimedoj troviĝas diversspecaj lernejoj kaj seminarioj, libroj kaj revuoj, prelegoj kaj diskutrondoj.

2. La fina celo de la informado pri esperanto estas porti kiel eble plej da homoj tra kiel eble plej da niveloj. Neniu nivelo estas neglektebla, interalie pro tio ke la lastaj niveloj retroefikas sur la unuajn per difino de la nombro kaj kvalito de la informpetantoj.

3. Bona informa strategio do same atentos ĉiujn nivelojn.

Mark Fettes

(teksto prezentita en seminario de UEA pri informado, 28.02-02.03.92, Poprad, Slovakio)

(el *Influo* n-ro 8, junio 1992)

Anekdotoj

- Alo?

- Bonan vesperon! Ni ŝatus tranokti ĉe vi pasportserve...

- Sorry, I don't understand Esperanto. Do you speak English?

Tio estis mia unua (kaj fakte mia nura) provo gastigi per *Pasporta Servo*. Vere ŝoka, sed per la angla ni povis interkompreniĝi kaj poste, surloke, interese babilis.

Evidentiĝis, ke Dita, el Prago, ne komprenas, kial ŝia nomo, adreso kaj telefono kuŝas en la listo de TEJO. Ŝi antaŭe apenaŭ sciis, kio estas esperanto, kiun ŝi neniam lernis (kaj ne havas, cetero, apartan intereson pri ĝi). Iu nekonata amuzemulo aligis ŝin kaj aldonis eĉ "volonte gastigos handikapulojn".

Evidente temas pri nova sistemo kapti pliajn esperantistojn (ĉu iu prenos telefonlibron ĉe ni kaj aligos duonan Barcelonon?).

Nu, se vi parolas la anglan kaj vizitas Pragon, indas gastigi ĉe Dita.

haf

Helpu kroatian esperantiston!



René Matoušek gitaras dum UK.
(foto: Heroldo de Esperanto)

René Matoušek estas unu el la viktimoj de la terura milito en Kroatio, kiu pleje frapis ĝuste lian urbon, Vukovar. Tiu ĉarma apuddanuba urbeto fariĝis la plej terura eŭropa ruinaro post la dua mondmilito kaj fine falis en la manojn de ĉetnikoj. La konkerantoj ne montris kompaton. La ruinojn oni elplatigis per buldozoj kaj la loĝantojn oni forportis.

René aktive partoprenis en la defendo sed ne per armiloj. Tio ne konformas al lia pacama karaktero. Li raportis dum la sieĝo por radio kaj kuragiĝis siajn samurbanojn elteni.

Post la eniro de la serba armeo kaj armitaj bandoj en Vukovar oni kaptis René, liajn patrinon kaj fraton,

kune kun dekmilo da aliaj urbanoj. Post restado en koncentrejo apud Zrenjanin oni liberigis la panjon kaj fraton, sed René restis. Fine li versajne estis kondukita al Niš, kie iuj samurbanoj aŭdis lian voĉon, sed ne vidis lin. Laste oni diris, ke li estus en Beogrado, en la iama faŝista koncentrejo Banjica. Liaj amikoj povis serĉi lin pere de Ruga Kruco, Amnestio Internacia kaj aliaj kanaloj. Sed neniu scias, kie li estas.

René lasis en la kroata Esperantujo spuron kvazaŭ meteoro. Li aperis subite, kiel studento de stomatologio, rapide ekregis la lingvon kaj fariĝis unu el la plej aktivaj kulturagantoj de sia generacio. Li verkis kaj kantis en la kroata kaj la esperanta; ĉiam svarmis ĉe li originalaj ideoj. Ni neniam forgesos la mallongvivan sed senkomparan orkestron *Ranoj*, en Velika Gorica, kie li loĝis. Tiam, en malfruaj sepdekaj jaroj, aperis lia unua kroatingva poemaro, kara kaj petola, amata de ĉiuj, kiuj lin konis. Eble ankaŭ pro lia ĉiam apudstanta gitaro kaj rava voĉo.

Post sia doktorigo li eklaboris kiel dentisto en serbaj vilaĝoj apud Zadar kaj fariĝis same amata kaj ŝatata de la loĝantoj. Laste mi vizitis lin kaj li rakontis, kiom li estis feliĉa vivi kaj labori kun tiuj homoj.

Kvankam respektata de la "oficiala socio", liaj simpatioj ĉiam estis ĉe alternativuloj, marginuloj, kaj minoritatoj. Paradokse, ĝuste tia homo iĝis viktimo de plej sovaĝa ŝovinismo, kiu ankoraŭ hororas en Eŭropo.

Se vi povas interveni ĉe vialandaj instancoj por pledi ĉe la Serbia registaro pri lia trovo kaj liberigo, nepre faru tion.

Nikola Rašić
(el *Kontakto*)

Bonvolu skribi al:

- Embajada de Jugoslavia
Velázquez, 162
28002 Madrid

Klarigu, ke René Matoušek ne perarmile partoprenis la defendon de sia naskiĝurbo Vukovar, kaj ke li troviĝas en nekonata loko, post forkonduko en koncentrejon apud Zrenjanin. Afable petu, ke la Jugoslavia registaro informigu pri lia situacio kaj sciigu ĝin al liaj familianoj. ■

Poprad: vizitenda esperantejo


Poprad estas mezgranda urbo en la nordo de Slovakio. Ĝi englutis en la lastaj jardekoj plurajn najbarajn vilaĝojn, kiuj tamen restas sufiĉe apartaj de la urbokerno. Unu el tiuj eksaj vilaĝoj estas la belega Spišska Sobota ['Sobota], naskigloko de nia karmemora Tibor Sekelj.

Spišska Sobota estas karega vilaĝeto, kiu ŝajne ankriĝis en la deknaŭa jarcento. Ĝiaj domoj staras plenaj de tiu tipe mezeŭropa karaktero. En la interno eblas renkonti nekredablajn vitrofenestrojn laŭ la jarcentkomenca "novstilo".

Spišska Sobota estas ankaŭ la sidejo de Slovaka Esperanto-Asocio (SEA). Ĝi tie posedas du domojn, kie konstante organiziĝas aranĝoj kaj loĝas esperantistoj, simile al la romanda La Chaux-de-Fonds. Diferenco estas ja la prezo: trankvili en Slovakio kostis ĉi-aŭguste po 2,5 USD (ĉ. 230 p-tojn) nokte. Tamen Poprad situas je duobla distanco ol Ĉaŭdefono kaj estas konate, ke la svisa restadejo organizas la plej prestiĝajn seminariojn en esperanto.

Ĉiukaze Spišska Sobota (malgraŭ ĝia diable malfacile elparolebla nomo) entute taŭgas por almenaŭ unusemajna turisma restado. Kaj ne tiel necesas antaŭmendo! Se la restadejo plenas, eblas gastigi en apudaj privataj loĝejoj.

Kelkajn kilometrojn for de vilaĝo staras la imponaj Visoké Tatry (Altaj Tatroj), kiuj rapidege atingas pli ol 2.600



Aervide al Internacia Kultura kaj Klireiga Centro en Slovakio
(Foto: Literatura Foiro)

metrojn, kaj kiuj nature limigas Slovakion kaj Polion. Per duonhora trajnado el Poprad eblas atingi la montopiedon kaj eksupreniri per ŝnurfervojo aŭ telfero al diversaj montosuproj. Se iu emas frue vekigi, eblas aĉeti bileton ĝis la plejalto de Lomnický štít je 2632 metroj.

La arbaro estas tie malvarmlanda: densa kaj diversspecia. Ege indas ekskursi laŭ bonege indikitaj vojoj, kvankam neniam oni sukcesos senti sin sola pro la turista svarmo, ĉefe el Ĉeĥio, Hungario kaj Polio. Rekomendindas pro-

meni tra la turismaj urbetoj ĉe la montopiedo, kie oni povas admiri belajn aŭstrieajn hotelojn el la aŭstrahungara imperia epoko. Ankaŭ fervojo, ŝnurfervojo kaj telfero datas de la unua duono de la jarcento, kio bele ĉarmas sed foje kaŭzas mankon de loko.

La tuta montaro, cetere, estas pretigita kiel grandega skiejo dum vintro.

Iam antaŭvidu, do, pasigi kelkajn tagojn en Spišska Sobota. Ĝi vere indas!

haf

Opinio: Gratulon kanarioj!

En la kongres-libro de la pasinta Universala Kongreso en Vieno denove Kanarioj staras alfabeto inter la diversaj landoj en la listo de partoprenantoj. Evidente, tio ŝuldiĝas ekskluzive al la meritega prestiĝo de prof. Régulo Pérez, la multjara eldoninto de la famega serio Stafeto.

Aliflanke, denove katalunoj devis stari sub siaj respektivaj ŝtatoj. Malgraŭ protestoj, en la kongresa alpinglaĵo, kiu

estas surloke farita por ĵusaliĝintoj, oni malakceptis skribi *Katalunion* kiel landon. Kompreneble pluraj mane gustigis tion.

ILEI akceptis, tamen, skribi kion ajn ĉe lando sur siajn diplomojn, laŭ la deziro de tiuj, kiuj sukcesis la ekzamenon.

Ĝis kiam UEA klopodos superforti eĉ la volon de unuopuloj?

Hektor Alos i Font

Poemo de Utnoa

William Auld enkondukas la eldonotan epopeon *Poemo de Utnoa de Abel Montagut i Masip*, kiu certe farigos unu el la nepre citotaj verkoj de nia literaturo.

La klasikaj epopeoj estis unuavice, ĉar ili konstruiĝis surbaze de mitologioj jam ĝenerale konataj kaj respektataj: la grekaj dioj kaj herooj (Homero); la fondado de Romo (Vergilio); la antaŭreformacia kristanismo (Danto); la postreformacia kristanismo (Miltono); naciĝoriga esplorado de "nekonataj" mondpartoj (Camoës); k.s.

Kie trovi, en nia epoko, mitologion sufiĉe fortan por ebligi epopeon? Kie, se ne en la fantascienco, tiu artoformo, kiu floris, evoluis kaj populariĝis dum tiu ĉi jarcento? -jarcento, en kiu adorado al la Scienco vigle konkurencas kun religiaj adoradoj, kaj dum kiu komenciĝis ankaŭ esplorado de nekonata regiono: la kosmo?

Tien sin turnis Abel Montagut por krei sian propran epopeon *Poemo de Utnoa*. Lia mitologio estas fantascienca; sed por fortikigi ĝin, por pli firme ankri

ĝin en niaj mensoj, li apogis sin ankaŭ per aludado al pramito, kiu troviĝas en Genezo, sed ankaŭ en la pramitoj de multaj aliaj gentoj kaj popoloj, nome la Inundo, kiam la teron kovris la akvoj, kaj homoj kaj bestoj postvivis nur dank' al la agado de unu "bona homo".

Tiuj du fadenoj formas la teksaĵon de *Poemo de Utnoa*. Sed epopeo postulas ankaŭ specialan versformon, kiu varias de unu al alia, tamen devas esti elasta kaj potenca, kapabla porti ĉian retorikon kaj ĉian konceptaron, ne bremsante la fluon de la rakonto. Tie ĉi Abel Montagut denove fresiĝis tradicion: li akceptis la Esperantan aleksandron (kiun Kalocsay kaj aliaj ĵuĝis netaŭga por senrima versado), sed li lerte modifis ĝin per aldono de unu mallonga silabo, kio liberigas ĝin de la rimpostulo kaj samtempe memo-

rigas pri la klasikaj versformoj de Homero kaj Vergilio -sed en moderna formo.

Tiel la poeto sukcesis krei artverkon unikan, kiun nia poplo certe akceptos kun entuziasmo kaj laŭdeme. En tutmonda kadro, la fantascienco inspiris ankaŭ iomete da poezio, sed ĝis nun (laŭ mia scio) kun nur modera sukceso. Ŝajnas al mi, ke *Poemo de Utnoa* estas la unua vere atentinda fantascienca epopeo en la mondo, kaj unu el tre malmultaj modernaj epopeoj. Mi nomis ĝin unika, kaj tia ĝi certe estas.

Estas do atuto por ni, ke tiu ĉi grava verko estas verkita en Esperanto. Kaj tamen mi starigas al mi ankaŭ la demandon: ĉu la lingvo ankaŭ ebligis la poemon? Esperanto estas finfine lingvo poezia kaj nepre moderna. Eble ĝi estas la lingvo plej taŭga por ĝuste tia ĉi arta kreado? Tian taksadon mi heredigas al la estonteco.

Intertempe mi ĝoje salutas tiun ĉi grandiozan verkon.

William Auld

Ŝirpecoj

La poezia fenomeno ekmanifestiĝis, neeviteble kaj nature, ankaŭ dum la aŭrorado de ĉiu pralingvo, kaj ĉiam kiel aganta bona ĝermo nepre necesa por ties firma kaj esenca evolua formiĝo. Tra la historio de la homaro, la kialoj de tiu universala kaj speciala bezono esprime estis diversaj: unu, ankoraŭ en nebula pasinteco, je la servo transdonadi voĉe de generacio al generacio, legajn kaj religiajn eventojn (kiam nur minimuma nombro da personoj kapablis legi strangajn signojn), kaj, multe pli poste, kiel en la nuntempo, cele pluki animstatajn kordojn.

Sed ĉiam la poezio estis diversaspekte natura efika fermento por ke lingvo riĉiĝu (aŭ pli ĝuste, por ke unusencaj vortoj akiradus eksternaturajn dimensiojn ideogramajn). "*Unue estis la poezio kaj, poste, la poetiko*". Mi tion diras parafrazante traŝan diron de Delfi Dal-

mau. Sed la leĝoj poetikaj kiuj antaŭe estis korsete rigidaj, pro la konstanta evoluo de la animstata homa esprimiĝo misia, iom post iom ili farigis pli kaj pli supraj cele al libereco favora al pli transcenda mesaĝo. La esperantlingva poezio ankaŭ, bonŝance, flosas en tiu senmalflusa tajdo.

La poemlibro kiu devigis min ĝin ellegi kun konstanta intereso, *Ŝirpecoj*, estas plej evidenta elmonro de tio, pri sentimentoj homaj de la nuntempo, kaj pri lingvaĵo kiu, leksikone kaj sintakse montras jenan evidentajn: ke la lingvo transformiĝas fidele en sian propran unuecon.

Ĉu unue estis, pri la sekso, la amoro kaj poste la amo? Ĉu per la amo la amoro digniĝas kaj agas reciproke? Ĉu la erotiko, se ĝi estas la arto de amoro, povas esti ankaŭ la arto de amo -eĉ de amo platona? Jes: multajn aliajn demandojn ni povas reprezenti al subjektiva prikonsiderado. Per siaj poemoj Christian Declerk prude-senprude, lirike, respondas laŭeble al niaj personaj duboj kaj kredoj.

Liaj versoj kaj stancoj konstante inklina al libereco, sed singardeme. Multaj vortludoj aliteraciaj ĵongle taŭgas por ke per evidentaj kontrastoj ni eniru en la rondojn kaj invitajn labirintojn de liaj fantaziaĵoj. Sed la fadenon de Ariadna neatendite ni povas perdi tie kaj tie tro facile.

La neologismoj ludas gravan rolon en la poemaro, sed ili povas esti, samtempe, stumbligaj. La libro, krom lirika, estas ankaŭ persone filozofia, kaj en la *Postparolo* la aŭtoro konfesas sin, praviĝe, laŭ principoj sciencaj kaj beletraj. Konklude: jen poemlibro tre bone elaborita, en kiu karno kaj spirito sin prezentas kune, sed en konstanta barakta disduiĝado. En la libro troviĝas sep desegnaĵoj de Herman R. M. Declerk, kaj bibliografia pago.

G. Mora i Arana

- DECLERK, Christian. *Ŝirpecoj*, erotika poemaro. Flandra Esperanto-Ligo, 1992. 1.200 p-toj. Mendebila ĉe KEA.

Sub influo de alkoholo

Ne timu, la aŭtoro ne estas homo, kiu verkas post diboĉa drinkado. La titolon de sia verko li simple prenis el tiu de la unua rakonto. Jes, ankoraŭfoje temas pri kolekto de rakontoj. Kvazaŭ ni esperantistoj estus pigraj legantoj, niaj verkistoj preskaŭ ĉiam nutras nin per facile digesteblaj noveletoj kaj rakontoj. Ĉu ne estas legantaro por romanoj?

Sed jen nova kolekto, dek du sendependaj rakontoj, antaŭe jam publikigitaj en revuo *Fonto*, kiuj legigas facile, glate, kaj kelkaj el ili bedaŭrinde ankaŭ seninterese.

Fakte, kiam la aŭtoro provas verki kortuŝan, sentimental-an rakonton li ne multe sukcesas. Ekzemple: lia *Am-afero* estas tiel kortuŝa kiel pugnobato; plenaj de tipaj dolĉegaj emocioj priskribitaj tipa-maniere.

Sed *Taglibro por kuirforno* ja estas alia afero. Ironia rakonto en formo de taglibro priskribante la kvar-monatan epepeon de geedza paro, kiu decidas aceti novan fornon. Multaj legantoj povos rekonii komunajn problemojn kaj situaciojn.

Kaj simple interesaj estas duono de la rakontoj, kie abundas surprizaj finaĵoj. La temoj estas tre diversaj, kaj ankaŭ la rolantaj homoj, kiuj tamen aperas nur skize priskribitaj el psikologia vidpunkto, kiel kutimas en tiaspecaj verkoj.

La lingvaĵo kaj stilo estas klaraj, simplaj, senpretendaj. La aŭtoro bone sukcesas faciligi la legadon, kiu okazas flue kaj seninterrompe. En tempo, kiam multaj verkistoj konstante faras lingvajn eksperimentojn, en kiu legantoj iĝas laboratoriaj musoj; estas tre agrable trovi aŭtoron, kiu verkas per "normalaj vortoj".

Tiurilate nur subite ŝokegas la neatendita apero de nova vorto *Haja!* (supozeble la angla "hi") kiel saluto tute superflua kaj kontraŭregula (a-finaĵo por ne-adjektiva vorto). Sed tio ja estas escepto.

Do, sufiĉe kontentiga distraĵo; por legi inter pli seriozaj verkoj.

Pedro Martín Burutxaga

- SULLIVAN, J. Herbert. Sub influo de alkoholo. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpen, 1991. 92 p. 14x21 cm. Mendebila ĉe KEA.

Misio sen alveno

La skoto John Islay Francis havas tre meritan lokon en nia originala literaturo. Li debutis en *Kvaropo* (1952), kune kun William Auld, Reto Rossetti kaj John Sharp Dinwoodie, per sia poemego *La kosmo*. Li elstaras ankaŭ kiel tradukisto, ĉefe dank' al la dua kanto de la *Perdita Paradizo* de Milton en la *Angla Antologio* (1957). Tamen liaj plej valoraj kontribuoj al la esperanta literaturo estas prozaj: la novelaro *Vitraro* (1960) kaj liaj du romanoj *La granda kaldrono* (1978) kaj *Misio sen alveno* (1982).

Tre intelekta aŭtoro kaj granda teknikisto, foje iom amara kaj ofte pesimisma, John Francis ŝajne ne sukcesis konvinki eldonantojn, tiel ke lia unua romano kuŝis dek jarojn en tirkesto, kaj legantoj ne facile povas ĝui liajn verkojn, des pli kiam lia unua romano delonge elĉeripiĝis, kio ne tiom oftas ĉe ni.

Misio sen alveno partoprenas tiujn ĝeneralajn aŭtorajn trajtojn. Jen konsciencie arkitekturita scienc-fikcia romano freskanta la homan naturon sub la iom akra lupeo de verkisto, kiu dissekcas siajn rolulojn, ĝis malkaŝo de iliaj plej bazaj celoj. Eble nur intendanto Halman restas iel mistika figuro. Plej interesa estas la figuro de Kaŭser, kiu iel bildigas mezulon: sen altaj celoj (krom eble fuĝi for de la edzino), li simple klopodas plej trankvile kaj senembarase pasigi la tempon; li ja iom friponas, sed nur laŭ neceso, sed ĉefe ege virinemas kaj ĉi-momente prisongas tion.

La romano tamen tute ne estas ruseca psikologia verko, sed viva priskribo de divers-kultura kunlaboro cele al serĉo de nova planedo por la enloĝantoj de la ŝtopita Tero. Tiu longega esplorado, komenciĝanta per longaj politikaj intertraktoj, startas sur la spaca plano, sed fine atingas tempan sferon...

La lingvaĵo de libro estas glate flua. Priskriboj neniam longas, tiel ke ofte ni ĝuas fresigajn dialogojn. La libro estas entute konsilinda eĉ al sporadaj legantoj de la fantasta ĝenro, ĉar ĝi ja estas sukcesa romano (kiom da lamas en nia originala literaturo!).

Hektor Alos i Font

- FRANCIS, John. Misio sen alveno. TK Stafeto, Antverpeno, 1982. ISBN 90 6336 021 5. 160 p. 21 cm. 1.400 p-toj. Mendebila ĉe KEA.

Serĉoj: la unua kaj dua centoj

Jen du verketoj, kiujn niaj literaturaj fakuloj neniam pritraktos, kiuj ne aperos en antologioj, sed tamen indaj je iom da atento.

Kvankam multaj esperantistoj ja estas serĉemaj homoj, ankoraŭ mankas al ni sufiĉe ampleksa stoko da parolaj esperantaj serĉoj, eble ĉar ankaŭ multaj esperantistoj ne sufiĉe bone regas esperanton por traduki el siaj propraj lingvoj tiujn "mallongajn prozajojn", kiel la kompilinto difinas serĉojn.

Sed la traduko de s-ro Tvaroŝek ja plejofte atingas sukceson, kaj donas al la serĉoj la ritmon kaj simplecon, kiujn ili bezonas. Kompreneble, vi ne devas esperi du horojn da senbrida ridado; skriba serĉo, legita senemocie, ekster amika rondo, ja ne estas ridinda afero. Malgraŭ tio, kelkaj el tiuj serĉoj estas tiel bonaj kaj originalaj, ke legante ilin vi volonte ridos.

La verkoj tamen ne estas perfektas. Pri la kompilado oni devas averti, ke abundegas serĉoj pri virinaj kliŝoj (edzinaj aŭ ne), kiuj eble ne multe plaĉos al niaj junaj samideaninoj (plej konsciaj en tiu tereno). Samtempe tute mankas maldedaj serĉoj. Eble la kompilinto lasis tion por posta specifa volumo. Ni atendu kaj esperu.

Kaj pri la adaptado, nur unu komento: s-ro Tvaroŝek ne ĉiam sukcesas krei vere internacian atmosferon. La famo de la eta Joĉjo kiel "terura" infano aŭ la famo de skotoj kiel egaj avaruloj (William Auld, pardonu min) ŝajnas esti internacie konataj, sed mi kredas, ke tiu pri la stulteco de grabovanoj neniam trapasis la landlimojn de Ĉeĥoslovakio. Ĉiu lando havas siajn stultulojn, ankaŭ Esperantio bezonas la siajn, kaj mi serioze proponas la idistojn por tio. Tiel, ni ne nur facile internaciigos niajn grabovanojn, polojn, lepeanojn k.s., sed ankaŭ nur malmultaj homoj ĝenos.

Malgraŭ siaj etaj mankoj, tiuj du verkoj povas provizi nin per komuna serĉado esperanta, kiu multe helpos dum interkonaj vesperoj kaj tedaj prelegoj.

Pedro Martín Burutxaga

- TVAROŜEK, Eduard (kompilis kaj esperantigis). Serĉoj. La unua cento / Serĉoj. La dua cento. Bratislava Esperanto-Klubo, Bratislava, 1992. 2x32 p. 10,5x14,5 cm. Mendebila ĉe KEA.

Kalejdoskopio por legemulo

En la lastaj monatoj mi legis kelkajn disajn librojn ege interesajn.

Mondo de travivaĵoj

Mondo de travivaĵoj de Tibor Sekelj estas eksterordinara sinsekvo de aventuroj de tiu fama mondvaganto. Tri-dek apenaŭ kredeblaj okazaĵoj promeniĝas la leganton tra ekzotaj landoj.

Tiu karuselo de mirindaĵoj komenĝas en la amazonia praarbaro, kie Tibor Sekelj subite decidas ŝanĝi la celon de sia ekspedicio kaj piediri kvar monatojn ĝis atingi tribon de hommanĝantoj. Tuj poste ni troviĝas grimpante erupciantan vulkanon en Centra Ameriko. Ni apenaŭ savis nian vivon, kiam sangsoifaj banditoj atakas nin en Etiopio. La sekva aventuro okazas en Nov-Gineo, kaj la posta konsistas en speleologia frenezajo en Meksikio...

Mi kutime ne ŝatas aventur-romanojn. La libro de Sekelj tamen tuj fariĝis vera idolo. La leganto tute partoprenas en tiuj fantastaj okazaĵoj, kiujn ja travivis nia heroo. La aŭtoro en tre interesa enkonduko prezentas sian vivon kaj klarigas, ekzemple, kiel li sukcesis havigi al si la necesan monon por komenci ĉiun novan ekspedicion. Cetere, la libro ĝuste bildigas ankoraŭ tiun romantikan periodon, kiam mankis fajnaj teknikiloj, kaj la mondvojaĝantoj ja estis sentimaj aventuruloj.

Se al tio oni aldonas, ke la lingvaĵo de la libro tute fluas, mi povas nur ege rekomendi al vi tiun bonegan verkon.

Sed nur fragmento

Vere fantasta perlo estas la libro de la aŭstraliano Trevor Steele *Sed nur fragmento*. Antaŭ unu jaro mi aŭdis de István Ertl, ke versajne temas pri la plej bona romano en esperanto. Estis surprizo, ke antaŭe nekonata aŭtoro debutis per 400-paĝa mirinda romano.

La verko fakte estas nekredible riĉa kaj vive interesa. Mi kelkajn punktojn ne kapablis dormi, pro tio, ke ĝi estas tiel

atentostreĉa en la 400-paĝo kiel en la deka. La romano priskribas la vivon kaj pensevoluon de rusa sciencisto dum lia vivo en insulo norde de Aŭstralio kaj poste en Kvinslando fine de la 19-a jarcento. Koloniismo fariĝas la ĉefa diskutemo de la verko, kiu pritraktas ankaŭ religion.

Kvankam la enhavo estas ege interesa, mirinda estas la pritrakto de la lingvo far Steele. Nekredible estas lia majstra elkreo de diversaj lingvo-tavoloj, de kruda ĵargono ĝis alta soleno. Li tion sukcesas per uzado de tute senneologisma lingvo, kvankam foje iomete sentigis anglalingva influo.

Mi nun devas konsenti kun István Ertl. Ĝi estas la plej bona romano, kiun mi iam legis en esperanto. Nepre rekomendinda!

The Esperanto Movement

La tria libro, kiun mi proponas al vi same estas tre diversa. Temas pri anglalingva doktora tezo pri la esperanto-komunumo. Peter G. Forster, angla universitata profesoro, pretigis la libron *The Esperanto Movement* el sia doktora tezo pri sociologio. Ĝin eldonis la prestiĝa nederlanda eldonejo Mouton.

La plej fama nacilingva prezento de esperanto ĉe ni estas la libro de Pierre Janton *L'esperanto*, en ties hispanlingva traduko. La verko de Forster deiras tute aliel. Ĝi tute ne pritraktas esperanton kiel lingvon, sed kiel komunumon kun apartaj trajtoj. Tiun komunumon li komparas kun aliaj sociaj grupoj kaj li ofte referencas al t.n. "stranguloj" esperantistaj.

La libro entenas du ege malsimilajn partojn, tiel pri la enhavo kiel pri la longo. La plimulto de la libro estas profunda trarigardo al la historio de la internacia esperanto-movado. Liaj analizoj estas fundamentitaj: abunde aperas citaĵoj, piednotoj kaj bibliografio, kiel nepre okazas en tezoj. Ili eĉ estas kelkloke pli aŭtoritataj ol en *Esperanto en perspektivo* pro la sendependeco de la aŭtoro: li ja ne estas unu el la ĉefaj rolantoj de nia historio, malkiel ĉe la libro ĉefredaktita de Lapenna. Ĝuste pro tio la libro fariĝas ankoraŭ pli interesa en la lasta ĉapitro,

kie la aŭtoro studas la esperanto-movadon post la dua mondmilito.

La dua parto, multe malpli longa kaj interesa, estas statistika esploro pri la esperanto-movado en Britio. La konkludoj de tiu parto ne ŝajnas aparte interesaj: kelkaj estas sufiĉe evidentaj, aliaj versajne ekskluzive britaj kaj aliajn oni devus esplori aliloke.

La esenco de la libro estas ja la socia sendependa aliro de la libro al la tuta historio de esperanto. Zamenhof estas profunde analizita: ne nur kiel iniciatinto de esperanto, sed ankaŭ kiel sionisto kaj religi-aganto. Ĉiam estas interesaj estas la pritraktoj de la grandaj korifeoj: de Beaufront ĝis Lapenna, kaj aparte klarvida estas la klara disdivido inter la diversaj sindetenoj al esperanto (de la homaranistoj al nurlingvo-uloj).

Resume, sendependa analizo, kiun nepre devus legi ĉiu interesito pri la historio de esperanto. Mi eĉ konsilus ĝin al ĉiu movademulo, kiel kontraŭpezo de movadaj legendoj. La angla uzata en la libro tute ne estas literatura, kvankam ĝi iom pli malfacilas ol simpla scienca lingvaĵo.

Hektor Alos i Font

- SEKELJ, Tibor. *Mondo de travivaĵoj*. Edistudio, Pizo, 1990 (dua eldono). 284 p. 22 cm. 1.400 p-toj.
- STEELE, Trevor. *Sed nur fragmento*. Fonto, Chapecó, 1987. 448 p. 21 cm. 3.100 p-toj.
- FORSTER, Peter G. *The esperanto movement*. Mouton Publishers, Den Haag, Paris, New York, 1982. Contributions to the sociology of language n-ro 32. 428 p. ISBN 90 279 3399 5. 23 cm. 2.800 p-toj. Mendebaj ĉe KEA.

Aboneblaj revuoj tra KEA

Frequencies	800 p-toj
Monato	3.000 p-toj
Literatura Foiro	3.100 p-toj
Konjarko	1.200 p-toj
Enismo	1.500 p-toj
Rok-gazet'	2.000 p-toj

La sono de Karlo

- Post la interparolo kun sia patro pri la formo de la tero, Karlo pripensis ankoraŭ tre ofte dum la tago. Strangan songon li havis en la sekvinta nokto. Li songis, ke s-ro de Lavel, la riĉa amiko de lia patro, lin invitis por kunvojaĝado en sia aeroplano.

Ili aĉetis grandan keston da biskvitoj, kaj metinte ĝin sur la aeroplanon, ili sidigis kaj ekflugis for. Ili devis transiri altajn montojn. La aeroplano flugadis tre rapide kaj trapasis grizajn nubojn. Estis malseke kaj malvarme. Karlo sin premis al sia gvidanto, dum ili pasis super akraj montpintoj kaj teruraj rokoj.

S-ro de Lavel montris al Karlo, kiel la ebenaĵo subite finiĝas en la malproksimo. Efektive Karlo vidis post la kampoj kaj arbaroj blankan linion kaj poste... nur la bluan de l' ĉielo. Tie estas la ekstremo de la mondo, kiun li tiel deziris vidi. La aeroplano baldaŭ surterigis. Marŝinte

kelkajn paŝojn, Karlo sin trovis ĉe la limo de la mondo. Estis granda kajo kun fera barilo inter limŝtonoj. Tenante la manon de s-ro Lavel, Karlo klinigis por rigardi malsupren: nenio, nur bluo... senfine. Zumadis en la oreloj de Karlo, kaj antaŭ liaj okuloj flugadis miloj da malprecizaj rondetoj. Li premis pli forte la dikan manon, kiun li tenis.

Li estus tre dezirinta, ĵeti ion malsupren, sed li ne povis trovi eĉ unu ŝtoneton. Tie estis nur sablo. Dum momento li pensadis, ĉu li ĵetos sian poŝtrancileton. Sed ekpensante pri sia patrino, kiu donis ĝin al li, li decidis, ke li ne ĵetos ĝin.

Ili ambaŭ mangis kelkajn biskvitojn tute malmoligitajn de la malvarmo.

-Nu, -diris s-ro de Lavel post momento, - ni nun veturos malsupren sur nia flugmaŝino, ĉu ne?

Karlo ektimis iom, sed nenion diris. Ili forflugis. La aeroplano transpasis su-

per la barilo kaj flugadis tute rekte for de la tero.

Post kelkaj minutoj, kiam ili estis jam tre malproksimaj de la tero, s-ro de Lavel ŝanĝis la direkton de la maŝino. Ĝi komencis oblikvan flugadon malsupren. Ili reproksimiĝis al la tero, kaj tiam ĝian subaĵon ili vidis. Karlo penis rememori la klarigojn de sia patro. Tio estis do la malsupra duono de la orango. Sed certe neniu povus vivadi tie. Nur per aeroplanoj aŭ per aerŝipoj oni povas tiel moviĝi sub la terglobo.

Pli kaj pli multe mallumiĝis, dum la aeroplano rapidege flugadis kurbe por restadi proksime al la tero. Stranga afero: la ĉielo estis malsupre kaj flanke, sed supre kaj ĉe la alia flanko estis la bruna tero.

La aeroplano estis malsuprenirinta tre rapide kaj povis nun flugadi preskaŭ horizontale. Ili ekvidis strangajn arbojn

Kiu estas Jozefo? Ekzerca bildstrio por la Zagreba Metodo verkita de J. Valano kaj V. Ivesić. IKS, Zabreb 1984.



kun longa torda trunko rampanta. Baldaŭ domojn ili ekvidis, verajn domojn pendantajn sub la tero. Ili estis tre multaj kaj ŝajnis esti lignaj dometoj diverskoloraj pentritaj. Ĉiam pli kaj pli multe ili alproksimiĝis. Karlo rimarkis, ke la dometoj havas pintan tegmenton kaj ŝajnas pendu je la tero per granda fera ringo ligita al la trunkoj kaj branĉegoj de la rampantaj arboj.

Inter la domoj estis pontoj, sur kiuj aperis multaj homoj ŝajne blanke vestitaj.

Klinante la kapon malantaŭen por pli bone vidi, Karlo perdis sian ekvilibron kaj falis en la abismon...

Li sentis la malvarman aeron siblantan ĉirkaŭ siaj oreloj, dum kiam li senfine faladis en la profundegajo.

- Nu, karuleto, estas malfrue, vi devas ellitigi!

La patrino lin vekis. Karlo frotis siajn okulojn:

- Patrino, -li diris oscedante, - mi vidis homojn sub la alia flanko de la mondo.

Edmond Privat

- PRIVAT, Edmond. Karlo, Facila legolibro. 7-a ĉapitro. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 1968. Dek-kvina eldono. 47 paĝoj

Proverboj

Proverbo estas konciza frazo, kiu prezentas ian konstataĵon aŭ konsilon pri la vivo. Kutime proverboj apartenas al la folkloro, al la tradicio de iu popolo. Ofte ili estas saĝaj, tre trafaj; ofte ili instruas utilan moralon; kelkfoje ili estas malpli noblaj, aŭ eĉ iom negativaj kaj cinikaj; sed ili ĉiam iom montras observadon pri la vivo, kia ĝi estas.

Ŝajnas, ke preskaŭ ĉiuj popoloj tra la mondo havas proverbojn. Ofte multaj popoloj, kun diversaj lingvoj, havas proverbojn samsencajn. Estas al tiu ĉi fakto, ke ni ŝuldas la ĉarman libron *Proverbaro Esperanta*.

Marko Zamenhof, la patro de nia Ludoviko Lazaro, kolektis proverbojn, trovis multajn proverbojn similajn en kvar lingvoj, la rusa, la pola, la franca kaj la germana. En 1905 kaj 1906 aperis tri malgrandaj libroj liaj kun paralelaj

proverboj. Li intencis verki kvaran libron kun similaj proverboj hebreaj, grekaj, latinaj kaj esperantaj. Sed Marko mortis en 1907 kaj lia kolekto restis nekompleta. Tamen, Ludoviko Zamenhof preparis esperantajn proverbojn similajn al tiuj nacilingvaj proverboj, kiujn kolektis Marko; kaj ili aperis kiel aparta libro, *Proverbaro Esperanta*, en Parizo en 1910. En La Laguna, en 1961, aperis nova eldono, kun la proverboj en alfabeto ordo.

Proverbaro Esperanta estas tre valora leg-materialo por ĉiuj, kiuj studas Esperanton. Ĉiuj verkoj de Zamenhof estas gravaj modeloj de lingvo-uzado; sed liaj esperantaj proverboj tre helpas pri la parola lingvo. Ili donas al ni multajn frazojn kaj parolturnojn por la ĉiutaga vivo. Fakte, ne ĉiuj frazoj en la *Proverbaro* estas proverboj laŭ strikta difino; multaj estas nur tiuj ĉiutagaj frazoj, kiujn ni ĉiuj bezonas: "*batadi la venton*", "*en la tago de sankta Neniamo*", "*fordormi la okazon*", "*li foriris kun longa nazo*", "*maro da mizeroj*", "*malsaĝa kiel ŝtupo*", "*nutri per promesoj*", "*propeka kapro*", "*sidi sur pingloj*", "*staris, ekfalas*", "*venis fino al mia latino*", ekzemple.

La veraj proverboj de Zamenhof, kiuj imitas alilingvajn proverbojn, sonas tre nature, impresas kiel folkloro de Esperanto. La tipa Zamenhofa proverbo estas frazo kun du rimoj kaj ia interna ritmo ekvilibra:

- "Al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso."
 - "Amo supermezura ne estas plezura."
 - "Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo."
 - "Fiso scias pri naĝo eĉ sen via saĝo."
 - "Hodiaŭ festene, morgaŭ malplene."
 - "Kio konvenas al sciuro, ne konvenas al vulturo."
 - "Komenco bona - laboro duona."
 - "Najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas."
 - "Per pacienco venas scienco."
 - "Vivu mizere, sed vivu libere!"
- Ne ĉiuj rimas; ekzemple:
- "Al feliculo eĉ koko donas ovojn."
 - "Ĉiu medalo du flankojn posedas."
 - "Eĉ blinda kokino povas trovi granojn."
 - "Hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo."
 - "Korniko vundita propan voston timas."

La avantaĝo de rimo estas, ke ni pli facile memoras la proverbojn. Ĉiu serioza esperantisto devas, se eble, legi kaj kelkfoje relegi la *Proverbaron*.

Libro, konata al anoj de du el la gravaj mondreligioj, kristanismo kaj judismo, enhavas multajn proverbojn: la bela libro *La Sentencoj de Salomono*. Ĉar Zamenhof mem tradukis la tutan Malnovan Testamenton -kolosa kaj altkultura laboro!- ankaŭ ĉi tiu verko estas modelo de esperanta stilo. *La Sentencoj* enhavas multajn frazojn, kiuj estas veraj ne nur por judoj kaj kristanoj, sed por ĉiuj homoj:

- "Virtulo kompatas la vivon de sia bruto; sed la koro de malvirtuloj estas kruela."
- "Trankvila koro estas vivo por la koro; sed envio estas pusto por la ostoj."
- "Pli bona estas malmulto, sed kun justeco, ol granda profito, sed maljusta."
- "Ornamo estas por la homo lia bonfaro."
- "Maldiligentulo estas en siaj okuloj pli saĝa, ol sep veraj saĝuloj."

Tamen, la pli granda parto de tiu bela libro konsistas el frazoj tro longaj kaj komplikaj por esti veraj proverboj; kaj parto de ĝi estas alta poezio.

Estas interese, legi proverbojn el diversaj landoj. Ofte proverboj enhavas similajn ideojn, sed la bildoj, kiuj esprimas la ideojn, taŭgas al lokaj kondiĉoj. Ekzemple, en kelkaj eŭropaj lingvoj ni trovas ion similan al la zamenhofa: "*Kiam kato promenas, la musoj festenas*." - Sed la zuluoj en Sud-Afriko diras samsence: "*La mustelo estas kontenta, ĉar la mambo eliris*." (Mambo estas danĝera afrika serpento.)

La angloj diras: "*Vi ne povas fari silkan monujon el orelo de porko*." Sed la japanoj esprimas tiun ideon alivorte: "*Eĉ se vi metos serpenton en bambuan tubon, vi ne detruos ĝian inklinon tordi sin*."

La danoj diras: "Tiu, kiu konstruos laŭ la konsiloj de ĉiuj, havos malrektan domon." - Sed la turkoj diras: "Ne tondu la voston de via azeno inter multaj homoj - unu diros 'Tro longa!' kaj alia diros 'Tro mallonga!'"

Multaj proverboj de diversaj popoloj prezentas memoreblajn, vivoplenajn, amuzajn bildojn. Jen kelkaj perloj:

- Itala: "Estas facile, minaci virbovon el fenestro."
- Usona kreola: "Estas netaŭge, ligi la hundon per ŝnuro el kolbasoj."

- Portugala: "Oni ne mortbatas erinacon per la pugno."
- Joruba (lingvo de okcidenta Afriko): "Mi preskaŭ kaptis la birdon!" - "Ne niu povas mangi preskaŭon el la kase- rolo."
- Egipta: "Tro da maristoj sendas la ŝipon al la marfundo."
- Skota: "Tiu, kiu ŝiris sian pantalonon, sidas tre senmova."
- Araba: "La barbiro lernas sian metion sur la vizago de orfo."
- Franca: "Estas pli bone lasi la infanon kun nazo muka, ol fortiri lian nazon."
- Hebrea: "Tiu, kiu mordis serpento, nun timas ŝnuron."
- Angla: "Ĉiu laŭ sia propa gusto, kiel diris la maljunulino, kiam ŝi kisis sian bovinon."

- Bulgara: "Ne metu erinacon en vian propran kalsonon."
- Latina: "Leporo povas tiri la barbon de morta leono."
- Ĉina: "Tiu, kiu rajdas sur tigro, ne povas degrimpi."
- Hinda: "La santalarbo parfumas la hakilon, kiu ĝin dehakas."

Eble iam iu esperantisto aŭ grupo de kleraj esperantistoj preparos grandan kolekton de interesaj proverboj el la tuta mondo? Jen valora, agrabla libro, ĉu ne? Kvankam unu el la proverboj de la skotoj estas: "Saguloj kreas proverbojn kaj stultuloj ripetas ilin."

Iasence, ni esperantistoj, kun nia propa lingvo, originala literaturo kaj kelkaj aliaj pecetoj de propa kulturo, estas popolo. Ni ne havas tradiciojn de multaj jarcentoj; sed ni rajtas kaj povas krei

nian propran folkloron. Ni povas krei niajn proprajn proverbojn. Sed ĉar Esperanto estas lingvo, kies ĉefa celo estas internacia paco, amikeco, kaj interkompreno, ni devas havi proverbojn ne cini- kaj, ne ŝovinismajn, ne malnoblajn, sed proverbojn pri espero, toleremo, paco kaj aliaj pozitivaj konceptoj.

Tra ĉi tiu legolibro vi trovos multajn novajn proverbojn. Se ili plaĉos al vi, eble vi memoros kaj foje uzos ilin. Se ili ne plaĉos al vi, eble iam vi mem kreas novajn pli belajn proverbojn?

Majorie Boulton

- BOULTON, Marjorie. "Faktoj kaj fantazioj" . - Progresiga legolibro. Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam, 1984. 430 paĝoj

NI LASTE RICEVIS ...

Originala prozo

Tiu toskana septembro

Leĝera krimromano rakontita per fluega lingvo.

- TAVANTI, Corrado, ERTL, István. Tiu toskana septembro. HEA, Budapeŝt, 1990. 1.000 p-toj.

Fundamenta krestomatlo

Teskoj elektitaj de Zamenhof por elmontri la imitindan esperanton.

- ZAMENHOF, Lazaro Ludoviko. Fundamenta krestomatlo. 18-a eldono printita de Gaston Waringhien. UEA, Rotterdam, 1982. 446 p. 2.700 p-toj.

Kiel (mal)venkigi esperanton?

Diversaj artikoloj, kiuj satire klarigas, kiel venkigi esperanton kaj kiel ĝin malvenkigi. La proponitaj metodoj estas la modkantista, la revoluciema, la partia, la grupkunvena k.a. La libreton enkondukas Raymond Schwartz.

- KANGURUO. Kiel (mal)venkigi esperanton? Artur E. Ittis, Pleasecastle, 1968. 20p. 21 cm. 200 p-toj.

Vagado sub palmoj

Membiofrafiaj rakontoj pri vivo en Saharo de unu el la plej bonaj stilistoj en esperanto.

- RIBILLARD, Jean. Vagado sub palmoj. Artur E. Ittis, 1977 (2a eld.). 52 p. 20 cm. Ilustrita. 450 p-toj.

Nesenditaj leteroj el Japanio

Vojag-impresoj de la fama kroatino, kiu per sia plaĉa lingvo priskribas gastadon en Japanio.

- ŜTIMEC, Spomenka. Nesenditaj leteroj el Japanio. Hukuoka Esperanto-Societo, Zagreb-Hukuoka, 1990.

Krokize de mia ĝardeno

Nova verko de multlibra aŭtoro, kiu bele tre pentras etajn krokizojn en bela eldono de LF-Koop.

- NEMERE, István. Krokize de mia ĝardeno. LF-Koop, Prilly, 1992. 60 p. 30 cm.

Originala poezio

Divershumore

Unu el la plej interesaj poemaroj de nia literaturo eldonitaj en la 80-aj jaroj.

- DE JONG, Rejna. Divershumore. Kardo, Glasgow, 1980. 36 p. 21 cm. 350 p.

Libro de amo

Sub diversaj kaŝnomoj tie aperas la famegaj fi(k)verkoj de Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien: i.a. la *Sekretaj Sonetoj*, ĉefverko de nia amor-literaturo.

- PENETER, Peter, PETERIDO PENETER, Georgo k.a. Libro de amo. Byblos, 1969. 262 p. 19 cm. 1.000 p-toj.

Tradukita literaturo

Sferoj 4

Kompilado de mallongaj fantastaj rakontoj el tre diversaj landoj kun tre plaĉaj bildoj.

- BORGES, Jorge Luis, PÁRAL, Vladimír k.a. SFEROJ, sciencfikcio kaj fantasto 4. Grupo Nifo, Santander, 1986. ISBN 84-398-5753-5. 130 p. 18,5 cm. 850 p-toj.

Sferoj 5

Kompilado de mallongaj fantastaj rakontoj el diverslandaj aŭtoroj kun tre plaĉaj bildoj.

- MITCHINSON, Naomi, PEĤHULOVA, Hana k.a. SFEROJ, sciencfikcio kaj fantasto 5. Grupo Nifo, Santander, 1987. ISBN 84-398-8777-9. 142 p. 18,5 cm. 850 p-toj.

Diversaj

Pasporta servo 1992

La fama listo, kiu enhavas ĉirkaŭ 900 adresojn en pli ol 70 ŝtatoj por senpage tranokti ĉe esperantistoj.

- Pasporta Servo, la listo de la gastigantoj de TEJO 1992. Kompilis Rob Keetlaer. TEJO, Rotterdam, 1992. 130 p. 1.000 p-toj.

Esperantonimoj

Unika vortaro de antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj, vortuludoj k.s.

- ĜIVOJE, Marinko. Esperantonimoj. Edistudio, Pizo, 1979. 120 p. 975 p-toj.

Korea eksprese

Lemolibro pri la korea lingvo verkita speciale por esperantistoj. Kvankam izolita lingvo, la korea estas parolata de ĉirkaŭ 70 milionoj da homoj kaj posedas alfabeton, kiu principe multe faciligas la lernadon

kompare al la apudaj ĉina kaj japana. En la libro la koreaj vortoj estas foje skribitaj nur latinlitere, sed ĉiam minimume en duobla versio. Problemo por memlernado estas pluraj sonoj, kiuj ne havas ekvivalenton en eŭropaj lingvoj.

- GIAN, Bak. Korea eksprese, facila aliro al korea lingvo. Hanshin, Seulo, 1989. 242 p. 22 cm. 2.200 p-toj.

La retoromanĉa

Verko, kiu pritraktas la originon, evoluon, literaturon kaj socian pozicion de la retoromanĉa lingvo en Svisio. La aŭtoro estas unu el la plej famaj svisaj esperantistoj kaj multjara parolisto en la esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia.

- BAUR, Artur. La retoromanĉa, sorto de la plej malgranda lingvo de Svislando. Hans Dubois, Bellinzona, 1984. 59 p. 30 cm. 1.400 p-toj.

Muziko

Aerlumo

Leĝera muziko el Brazilo.

- FONSECA, Flávio. Aerlumo. 1990. 1.600 p-toj.

Kino

Angoroj

La unua filmo originale en esperanto, filmita en 1964 kaj nun en vidbenda versio.

- MAHÉ, Jacques-Louis. Angoroj. LF-Koop, 1992. VHS. 60 mn. Blank-nigra. 3.000 p-toj.